



# LA JUNA VIVO

Monata gazeto de "TUTMONDA ESPERANTO-JUNLAR-ORGANIZO".

Redaktejo: S-ino E. Burgler, Amsterdam-W. Overtoom 435/II.  
Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55.  
Nro de ĝirkonto por Nederlando: 537168.  
Jarebono: 3 ned. guldenoj, au egalvaloro.

## Nia I.J.K.

La ĉijara IJK organizata de la Itala Sekcio de TEJO okazos, kiel vi jam scias, en l'Aquila (ĉefurbo de regiono Abruzzi) de la 7a ĝis la 13a de aŭgusto.

Ni fiksis ĉi tiun daton konsiderante, ke en kelkaj landoj, kiel en Anglujo, la lernejoj fermiĝas malfrue. Krome ni volas ebligi al la partoprenantoj de la 40a U.K. viziti nian kunvenon post Bolonjo.

Fakte post la solena fermo de la U.K. kiu okazos matene la 6an de aŭgusto, oni povos facile atingi nian urbon, kie nia IJK malfermiĝos la 7an de aŭgusto je la 12a horo por festi kune nian ĝojan 11an kunvenon sub nia varma suno (finfine vi diros!) kaj senkompare blua ĉielo.

### KAJ NUN KELKAJ EROJ DE NIA PROGRAMO:

Fidelaj al la devizo, ke ĉiu partoprenanto devas esti pli aktoro ol rigardanto, por ke niaj IJK-oj estu pli fruktedonaj kaj interesaj, ni aranĝos diversajn konkursojn. Ni esperas, ke ili bonsukcesos per via kunlaboro kaj via vigla partopreno.

Ĉiuj konkursoj, kiujn ni ankoraŭ pritraktos, estas eroj de ĝenerala konkurso, kies premio estas senpaga semajna restado dum nia postkunveno. Ĝi okazos tuj post nia IJK aŭ en nia urbo, aŭ en ĝia proksimeco.

La gajnintoj de ĉiu konkurso ricevos premion kaj la grupo (ĉirkaŭ dek personoj), kiu gajnos la plej multon de la poentoj, povos ĝui nian postkunvenon tute senpage.

Poste ni publikigos detalan regularon, sed ni deziras aŭdi viajn proponojn, scii ekzemple, kiom da grupoj estas pretaj, kian specon de sporto oni scipovas ludi - ni disponas pri kampoj de ĉiu sporto - ni deziras scii, ĉu vi preferas teatraĵeton, kabaredon, au seriozajn teatraĵojn.

Donu al niaj IJK-j pli vastan signifon kaj faru ilin pli interesaj.

Se niaj konkursoj sukcesos, ili estos la bazo por la organizado i.a. de sporta societo kun la aranĝado de malgrandaj olimpiadoj,

por la efektiviĝado de rondvojaĝoj tra Eŭropo kun grupoj, kiuj povas kaj pretas prezenti ion.

EKAKTIVU KAJ KONTAKTU KUN NIA LOKA KONGRESKOMITATO!

# *La programo*

Dimanĉe, 7/8:

matene: akcepto de la partoprenantoj  
posttagmeze: solenaj malfermo-diservoj  
vespere: interkona vespero

Lunde, 8/8

matene: promenaĵo tra la urbo kaj vizito de diversaj vidindaĵoj  
posttagmeze: fotado, intervjuoj  
vespere: itala festvespero

marde 9/8

matene )  
posttagmeze ) tuttaga ekskurso  
vespere: teatra konkurso.

merkrede 10/8

matene )  
posttagmeze ) jarkunsido  
vespere: teatra konkurso

ĵaŭde 11/8

matene )  
posttagmeze ) sporta tago  
vespere )

vendrede 12/8

matene )  
posttagmeze ) tuttaga ekskurso  
vespere: kultura vespero

sabate 13/8

matene )  
posttagmeze ) duontaga ekskurso  
vespere ) internacia balo

Dimanĉe 14/8

matene: komuna matenmanĝo kaj foriro de la partoprenantoj, kiuj ne ĉeestos nian postkunvenon.

La konkursoj konsistas precipe el:

- 1) sporto
- 2) teatraĵo
- 3) skizo de afiŝanonco pri nia IJK
- 4) poezio.

Amuzaj kaj distraj aranĝoj ĝojigos la partoprenantojn.  
 Ekskursoj al la plej belaj pejzaĝoj de nia regiono, inter kiuj  
 nia Nacia Parko de Abruzzi, kie ankoraŭ vivas brunaj ursoj kaj  
 la agloj; simbolo estas de nia urbo la aglo.

K o t i z o j :

La kongreskotizo (inkluzive sojn) estas:	mangaĵojn, loĝadon kaj ekskursojn	antaŭ	Por TEJO-anoj	antaŭ
		1/5.		1/7.
		L.it.		L.it.
ĝis 18 j.	7000.--			7500.--
" 30 j.	7500.--			8000.--
pli ol 30 j. (°)	8000.--			8500.--

(°) = por karavanestroj, amikoj de junularo, specialaj invititoj kaj geinstruistoj.

NE TEJO-ANOJ PAGOS 500 LIROJN PLI!

Anoncu vin ĝustatempe, ĉar cetero L.O.K. ne povas garantii ĉu via anonco akceptigos, aŭ ne.

Antaŭpagon de la kongreskotizo (fiksita je 2000.-- liroj) oni sendu samtempe jam kun la aliĝilo.

Kondiĉo por partopreni estas la kono de Esperanto.

(100 liroj estas + 60 nederlandaj cendoj.)

UNUA LISTO DE LA PARTOPRENANTOJ AL NIA IJK.

1) Giuliani Umberto, Firenze, Italujo, 2) Rosa Bianca, Roma, 3) Boscarino J. Stanislao, Ragusa, 4) Vitaliani Giorgio, l'Aquila, 5) Cioni Adelmo, l'Aquila, 6) Lanna M. Teresa, Latina, 7) Volpe Mimma, l'Aquila, 8) Gentileschi Tina, l'Aquila, 9) Gentileschi Gianna l'Aquila, 10) Brombin Graziella, Pesaro, 11) Di Giacomo Ann, New York, Usono, 12) Kraefft Roel, Hilversum, 13) Burgler E. Amsterdam, 14) van Spengen Corry, Hilversum, Nederlando, 15) Frank Buckley, Bristol, Anglujo, 16) Reiter Heinrich, Salzburg, Austrujo.

Oni skribis al ni:.....

Yves Peyraut (Saintes, Francujo): "... sendube ni estos almenaŭ tri el Saintes, kiuj kongresos...."

Frank Buckley (profesia teatra reĝisoro, Bristol, Anglujo): "...mi tre ŝatos ĉeesti la kongreson en l'Aquila..post vizito de la Bologna kongreso...Bonvole enskribu min...kaj se mi povos vin helpi laŭ la programo, voku al mi....."

Gerhard Kiesling (Hildesheim, Germanujo): "...mi volas prepari, se estas sufiĉe da partoprenantoj, karavanon al via urbo...."

Richard Reuchlin (Mannheim, Germanujo): "...kelkaj knabinoj (14-17 jaraj) de nia loka grupo intencas partopreni la 11an kongreson de TEJO.- Bonvolu sendi al mi la unuan kongresbultenon kaj 6 aliĝilojn...."

Resl Kainer (Wörgl, Austrujo): "...mi tre kore deziras bonan sukceson. Mi partoprenos en la kongreso...."

Toni Hopfenmüller (Aschaffenburg, Germanujo): "...sendu al mi la novaĵojn pri la venonta TEJO-kongreso kaj 15 aliĝilojn...."

Eddy Bosboom (Den Haag, Nederlando): "...mi ĵuris iri la venontan jaron al Italujo ne nur por viziti la kongreson, sed ankaŭ pr vidi vian landon."

Corry van Spengen (Hilversum, Nederlando): "...du tagojn po semajne mi manĝas "spaghetti" aŭ "maccheroni" por alkutimiĝi al ĝi, ĉar venontjare, kiam mi estos en via lando, mi devos manĝi ilin ĉiu tage." (Tute ne vere! diras L.O.K. Ni ne kutimas manĝi ĉiam spaghetti, sed nur unu aŭ dufoje semajne.)

L.O.K. de l'Aquila.

# Organizaj Informoj:

Anglujo: El raporto de la kasistino de nia angla sekcio montriĝas, ke la plej multo de la anglaj membroj kaj abonantoj ne pagis kotizon, kelkaj eĉ dum pluraj jaroj. Ni povas kompreni, ke pro la malregula aperado de LJV multaj hezitis dum la lasta jaro pagi sian kotizon. Tamen de nun LJV aperos ĉiumonate kaj ni esperas tiel arangi la administradon kaj ekspedadon, ke la bulteno plej eble regule alvenu.

Tamen ĉi tiu nro estos la lasta, kiun ni sendos al tiuj membroj, kiuj ne pagis kotizon por la jaro 1954/55. Samtempe ni anoncas, ke ĉi nro estas la lasta stencilita ekzemplero, estontece aperos LJV denove presita. Ni do nepre petas al vi, bonvolu tuj pagi vian kotizon, ĉar ni tre bedaŭrus, se multaj, ofte jam malnovaj membroj kaj abonantoj ne plu restus fidelaj subtenantoj de TEJO.  
KOTIZON VI BONVOLU SENDI AL F-ino N. REES, DERWYDD, SEVEN SISTERS, NEATH.

Germanujo: La kasistino kun danko konfirmas la ricevitan sumon de 178.84 ned. guld. kiun sendis amiko Rolf Brune, Dortmund. Temas pri sumo, kiun li pasintjare, resp. antaŭ 2 jaroj sendis al Wörgl.-

Geamikoj Tutmondaj! Ĉu vi ie legis artikolon pri TEJO? - Sendu ĝin al nia Dokumentada Fako.

Ĉu ia grava junulara kunveno okazis(-os) en via lando? - Raportu tion al nia Dokumentada Fako.

Montru, ke vi almenaŭ tiamaniere pretas kunlabori.

Helmut Lehmann, Berlin-Neukölln,  
Bornsdorferstr.27.

Abonantoj Ekster-Nederlandaj atentu! La jaraabono de LJV estas 3 ned. guld. aŭ egalvaloro. Se vi deziras pagi la abonkotizon per Internaciaj Res ondkuponoj, pripensu, ke la kontraŭvaloro de unu respondkuponon estas la valoro de unu poŝtmarko al eksterlando, t.e. 25 c-j. !! 3 ned. guld. = 12 Int. Resp.kup. !! Pagu do preferu per poŝtmandato, aŭ al la landaj perantoj. Tio estas por ambau partioj pli avantaĝa.

## K O R E S P O N D U !

Ĉeĥoslovakujo: Břetislav Nevrlý, Zeyerová 13, OLOMOUC, dez.kor.per fil.afr.let.kaj interŝ.il.pk. gazetojn, librojn, florsemojn ktp. ĉefe kun ekstereuropaj landoj.

Germana Demokrata Respubliko: Rudi Burmeister, Popolarto-Kolektivo "Wismuth" GRUNA ĉe KARL MARX STADT; dez.kor.kun ĉiuj landoj por montri, ke Esperanto vivas. Skribu multnombre.

Germanujo: 46 gejunuloj 16-25 jaraj dez.kor.kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Skribu al: Esperanto Grupo "Prospero" NEUSTADT/Weinstr.

Nederlando: Jun. Klubo "Ekstazo" organizas la 16an de aprilo letervesperon kaj petas grandamasan alsendon de bildkartoĵoj, leteroj ktp. Respondo garantiata. Adreso: LEEUWARDEN, Celebesstr.18.

Interesemuloj bv. noti la adresŝanĝigon de gesroj Tammo Kanter. Ĝi estas: ARNHEM, Kastanjelaan 43.-

La 33a Germana Esperanto Kongreso okazos en Neustadt an der Weinstrasse dum Pentekosto 1955. Interesemuloj skribu al Esperanto-Grupo "Prospero" Neustadt/Weinstrasse.

EN NEDERLANDO OKAZOS PENTEKOSTA KUNVENO EN PUTTEN. KOSTOJ = 6 GULD.  
JAM NUN ANONCU VIN ĈE BEN v. MOORS, Eendrachtspark 19. BUSSUM.